

Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2021

Jarkolekto 8 - Numero 2



Kremnica medalo 1980 - Radšpinila pregilo

Medalo 1979 Monerekspozicio en Prago

ENHAVOTABELO

de aprilo 2021

Titolpaĝo: <i>Kremnica medalo - Radŝpinila pregilo</i> <i>Medalo 1979 Monerekspozicio en Prago</i>	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni!	3
Moneroj & medaloj	4
<i>28a Hispana Kongreso de Zaragoza 1967</i>	
<i>La Progreso Ĉeĥio 1987</i>	
<i>Rūdolfs Libeks (1854-1908): la unua latvia esperantisto</i>	
<i>Franz Jonas (1899 – 1974)</i>	
<i>Atlantis 1933</i>	
Medalistoj: 25. Dana Puchnarová (°1938)	11
Spikumajoj & suplementoj:	
La “malapero” de unika kaj ikona zamenhofa medalo	13
Aspektoj de numismatiko: “Mirakla talismano” el Francio (1830)	14
Por spuremuloj!	16
Historiaj aspektoj: Kluba medaleto de “La Verda Stelo” (1907)	17
Terminaro: alfabeto listo (25)	21
Valormarkoj & valorbiletoj: Atesto “Esperanto-Hotelo” Herzberg	23
Numismatika Forumo: Ĉu ankaŭ arĝento? (Terry Watts).....	25
El la gazetaro	29
Retpoŝto	30
Anoncoj & eventoj	35

Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts
Provlegado: Jozefo Horvath
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be
Retejo: <http://ena.frali.bplaced.net>
www.esperanto.es/biblioteko
www.kolektado.esperanto.cc

DE NI POR ... NI!

Karaj membroj kaj legantoj! Jen antaŭ viaj okuloj aŭ en viaj manoj la dua numero de la oka jarkolekto, la aprila.

Via redakcio kontentiĝas pro la “reta” ENA, sed samtempe simpatias, aŭdante aliajn asociojn plendi, ke la sendo de multaj el niaj esperantistaj gazetoj kaj revuoj dum ĉi pandemia epoko estas vere granda ĥaoso. Nia revuo bonŝance ne bezonas plendi pro nekredeblaj poŝtaj fuŝoj, kiel ĉe samregionanoj de aliaj asocioj, kiuj ricevis bultenon je semajnaj distancoj, se ĝi ne tutsimple malaperis... Do la krizo malhelpas ne ENA-n provizi sian legantaron ĝustatempe per variaj artikoloj, aktualaj, profundaj, foje iom pli pezaj (ni konfesas!), foje eĉ surprizaj...

Kiel kutime ankaŭ en ĉi jarkolekto apartan atenton ricevas la kovropaĝoj; ĉi-jare ili fokusas numismatikajn, antikvajn aparatojn kaj samtempe la belecon de medaloj el arta kaj estetika vidpunktoj. Nu, **viaj ideoj kaj proponoj** por la venontjaraj kovropaĝoj estus por ni grandaj helpo kaj subteno, ĉar en kapo de multaj kuŝas pli da (brilaj) ideoj ol en ununura, ĉu ne?

En nia rubriko “Moneroj & Medaloj” ni montras ĉi-foje kvin “freŝajn” medalojn, kiuj meritas lokon en la iam (ĉu baldaŭ?) kompilenda kaj eldonenda Unua Katalogo, kiu ankoraŭ ne havas definitivan titolon. **Se vi havus propono(j)n...**

Ke nia Zamenhof ricevis du oficialajn dekoraciojn estas sendube konata al la plimulto de la esperantistaro. Tamen, ĉu la aserto, ke Ludoviko jam en 1913, okaze de la 25-jara jubileo de Esperanto, en 1912, ricevis vere oran, 50 gramojn pezan spesmilon kun unika kaj ununura valorindiko estus nur mito? En ĉi numero vi fine ricevos konviktan respondon kaj eĉ “foton” de tiu enigma artefakto.

Por alia provizore enigma medalo en la rubriko por spuremuloj ni petas helpon de niaj legantoj. Temas pri ĉeĥoslovaka memormedalo pro “Marŝo por paco” en la jubilea jaro 1987. Ĝis nun nia esplorado estis vana kaj tute malsukcesa, sed jam ofte la “kavalerio” savis nin!

Por la kolektantoj de (esperantaj) religiaj talismanoj ni trovis unuafoje tiel nomatan “miraklan medalon” en esperanta versio, kiu ilustras rakonton pri iama mirakla aperaĵo en Francio de la Virgulino, kiun katolikoj konsideras esti la patrino de la Jesuo el la Nova Testamento.

Ni evidente en ĉi redakcia rubriko ne malkaŝos al vi la enhavon de multaj aliaj rubrikoj, por ne fuŝi vian plezuron mem malkovri diversajn interesajn novaĵojn.

Ni tre volonte, fine kaj fiere, heroldas al vi ĉiuj, ke ni en januaro bonvenigis kiel 146-an individuan membron nian duan samideanon el Irano! Dume ni jam havas entute 148 individuajn kaj 22 asociajn membrojn! Kresku tiuj nombroj!

Ni tutkore deziras al vi ĉiuj agrablan legadon kaj korespondemon!

Bert

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo E1 - Ordenaspektaj medaloj

28a Hispana Kongreso de Zaragoza 1967



Lando: Hispanio

Metalo: aluminio

Diametro: 30 mm

Jaro: 1967

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 9,3 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: 2 mm

Averso:

Supre: XXVIII HISPANA KONGRESO

Meze: granda verda stelo

rubandeto kun "ESPERANTO" parte kovras la kronitan urban blazonon de Zaragoza.
inter la mezaj bildoj troviĝas amaso da samaspektaj ornamaĵoj.

Sube: JULIO 1967

°ZARAGOZA°

Rimarko: urba blazono kaj situo de Zaragoza.



Tipo D1 - Esperantaj unuflankaj medaloj

La Progreso Ĉeĥio 1987



Lando: Ĉeĥio

Kvanto: *serĉata*

Metalo: *serĉata* /orkolora

Pezo: 20 g

Mezuroj: 49 x 49 mm

Medalisto: Dana Puchnarová

Jaro: 1987

Diko: 2 mm

Averso:

Meze: en cirklo du manoj, unu tenanta libron, la alia floron.

Supre: “LA PROGRESO”

Sube: nomo de urbo en Ĉeĥio: ČESKÉ BUDĚJOVICE

Rimarko 1:

“La Progreso”: Esperanto-klubo en ČESKÉ BUDĚJOVICE

Rimarko 2:


sur la plakedo estas du manoj, libro kaj floro. Unu mano tenas la libron (simbolo de E-instruado) kaj la dua mano floron (simbolo de iu nova ekfloro por la tuta homaro).

Rimarko 3:

la medalo estis eldonita omaĝe al la 100-jariĝo de Esperanto. Ĝia eldono estis kunligita kun ekspozicio por lernejoj kaj por la publiko, kiun la klubo aranĝis en Muzeo de Laborista Revolucia Movado en suda Bohemio, kvankam en tiu epoko ne estis rekomende tro laŭte paroli pri Esperanto, kaj tute ne propagandi ĝin. La evento tamen estis unu el la plej sukcesaj aranĝoj de la klubo.

Rimarko 4:

la plakedon modelis akademia pentristino, sinjorino Dana Puchnarová, kiu ankaŭ zorgis pri ĝia eldono. La simbolo sur la medalo estis montrita ankaŭ sur granda bildo, kiu bonvenigis vizitantojn de la ekspozicio. Ĝi ankaŭ troviĝas sur la afiŝoj, kiuj anoncis la ekspozicion. Poste la simbolo fariĝis la ne oficiala simbolo de la klubo kaj ĝi estis uzata dum postaj aranĝoj, kiel renkontiĝoj, baloj, k.a.



La redakcio dankas Libuse Dvorakovan kaj la Esperanto-muzeon de Svitavy pro la helpo kaj la donacemo.

Tipo D1 - Esperantaj unuflankaj medaloj

Rūdolfs Libeks: la unua latvia esperantisto (1854-1908)



Lando: Latvio

Kvanto: *serĉata*

Metalo: bronzo

Pezo: *serĉata*

Diametro: 88 mm

Medalisto: Jānis Strupulis

Jaro: 1981

Diko: *serĉata*

Averso:

ĉirkaŭa surskribo supre: ● RŪDOLFS LIBEKS 1854-1908 

sube: LA UNUA LATVIA ESPERANTISTO

meze: busto de Libeks iom maldekstren

Rimarko 1:

ekzistas variaĵo en argilo

Rimarko 2:

R. Libeks estis instruisto kaj pioniro de Esperanto. Li verkis la unuan Esperanto-lernolibron por Latvio. Ĝi krome estis la unua lernolibro presita ekster Varsovio, aperis en 1889 ĉe Sichman en Rigo kaj estas notita en la listoj de la unuaj Esperanto-libroj kiel n-ro 29.

Franz Jonas (1899-1974)

Franz Jonas estas precipe konata kiel urbestro de Vieno (1951–1965) kaj prezidento de la Respubliko Aŭstrio (1965–1974). En la biografioj pri Franz Jonas Esperanto nur marĝene estas rimarkata, kvankam ĝi ludis gravan rolon por li – precipe dum la intermilita periodo.

En danckurso en 1920, li renkontis dancpartnerinon, Margarete Towarek (1898–1976), kiu iĝis plej grava persono en lia vivo. Spertante, ke ili havas similajn ŝatokupojn, ili geedziĝis en decembro 1922. En la sama jaro Franz Jonas konatiĝis kun Esperanto, kiam li kompostis Esperantajn gazetojn. Jonas tuj interesiĝis pri Esperanto, kiun li eklernis kune kun sia edzino en la “Arbeiterheim” kaj li ankaŭ aliĝis al la laboristaj esperantistoj. Ankoraŭ en 1922 li iĝis sekretario de la Aŭstria Laborista Ligo kaj komencis internacian korespondadon. Li lernis la lingvon tiom rapide, ke li jam en 1923 brile trapasis la porinstruistan ekzamenon kaj ekgvidis Esperanto-kursojn.

En la sekvontaj jaroj Franz Jonas intense dediĉis sin al Esperanto kaj al la laborista Esperanto-movado. Li iĝis estro de la Esperanto-grupo *Frateco*, regule parolis ĉe ties kunvenoj kaj en 1925 kunarangiĝis la kvinan SAT-kongreson en Vieno. Li konatiĝis kun Otto Simon (1876–1941), kiu tiutempe estris la Aŭstrian Laboristan Ligon Esperantistan (ALLE) kaj samtempe membris en la ŝtata ekzamena komitato pri Esperanto. Estiĝis baldaŭ amikaj interrilatoj inter Jonas kaj Simon. Kiam ALLE aperigis sian propran gazeton *La Socialisto* en 1926, Franz Jonas estis ties kunfondinto kaj ĉefa organizanto. Ĝis la malpermeso de la organo en 1934 li verkis por ĝi multajn artikolojn, kiuj ankaŭ spegulas lian sintenon al Esperanto. Kiel juna laboristo Jonas forte identiĝis kun la idealoj de la Socialdemokratia Partio en Aŭstrio. Sekve, laŭ lia vidpunkto, Esperanto estu ilo por venki la kapitalismon kaj helpi la internacian socialismon, ĝi estu helpilo por realigi la devizon: “Proletoj el ĉiuj landoj unuigu vin”. La demandon, kial gelaboristoj lernu Esperanton, li respondis tre klare: por ke ili povu batali kune kun gelaboristoj el la tuta mondo kontraŭ la kapitalismo. “Kaj tion ili povas pli bone kaj pli facile, se ili regas la internacian lingvon Esperanton” (*La Socialisto*, 1930, №73). *La Socialisto* ankaŭ indikas, ke Franz Jonas, kiel estrarano de ALLE, tre intense kaj aktive partoprenis la diskutojn dum ties ĝeneralaj kunvenoj. Interalie li referis dum la ĝenerala kunveno en 1931 pri la historio de SAT, precipe pri la diferencoj inter la komunistaj kaj socialistaj membroj. Pro tiuj diferencoj li estis en 1933 kunfondinto de la Internacio de Socialistaj Esperantistoj.

Post la intercivitana milito kaj la malpermeso de la Socialdemokratia Partio en Aŭstrio, en februaro 1934 Jonas estis akuzita pro ŝtatperfido kaj arestita por 14 monatoj, ĝis kiam li estis deklarita senkulpa kaj fine liberigita komence de 1936. Tamen, kiel socialisto kaj esperantisto li iĝis suspektinda persono kaj restis ĝis la fino de la Dua Mondmilito en danĝero esti denove malliberigota.

Poste komenciĝis lia rapida politika kariero: sekvinte Theodor Körner kiel urbestro de Vieno en 1951, Franz Jonas okupiĝis plene pri siaj politikaj taskoj kaj ofte plenumis sian oficon 16 horojn tage. Tamen, ankaŭ kiel urbestro de Vieno kaj poste kiel prezidento de Aŭstrio li ĉiam volonte akceptis Esperanto-delegaciojn kaj apartajn esperantistojn kaj restis en konstanta letera kontakto kun siaj esperantistaj amikoj. Jam kiel urbestro Franz Jonas protektis kaj elstare partoprenis la 35an SAT-kongreson en Vieno (1962).

Sed la kulmino estis la protektado de la 55a Universala Kongreso de 1970 en Vieno kaj lia esperantlingva parolado ĉe la inaŭguro antaŭ pli ol du mil partoprenantoj.



Prezidento Franz Jonas kaj Ivo Lapenna dum la 55a Universala Kongreso en Vieno, 1970 (Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, ÖNB/Esp: 497 C)

Bernhard Tuider

Bibliotekisto de la Nacia Esperanto Muzeo en Vieno

Integra teksto: *La Ondo de Esperanto*, oktobre 2013, №10
La Balta Ondo <https://sezonoj.ru/2013/10/228jonas/>

ENA kore dankas Bernhard pro la permeso mallongigi kaj publikigi lian artikolon.

Tipo B1 - Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto

Franz Jonas (1899 – 1974)



Lando: Aŭstrio

Metalo: oro (.900) polurita

Diametro: 19,2 mm

Jaro: *serĉata*

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 3,5 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: *serĉata*

Averso:

meze: portreto de Franz Jonas maldekstren


sub la kolo: COLC(?)

Sube: FRANZ JONAS

Reverso:

ĉirkaŭskribo: BUNDESPRÄSIDENT DER REPUBLIK ÖSTERREICH (= Federacia Prezidento de la Respubliko Aŭstrio)

meze: la federacia blazono kun kronita unukapa aglo, portanta serpon (simbolo de la agrikulturo) kaj martelon (simbolo de la industrio)

sube:  signo de la monerfarejo

→  . 900: titro de oro

Tipo C3 - Fantaziaj esperantaj moneroj

Atlantis 1933



Lando: Bahamoj

Kvanto: *serĉata*

Metalo: bronzo

Pezo: 2,72 g

Diametro: 19 mm

Medalisto: *serĉata*

Jaro: 1933

Diko: 1 mm

Averso:

supre: ATLANTIS

meze: valoro 5 en radiokrono

sube: “skaloj”: esperantlingva pluralo de la valorindiko “skalo”.

Reverso:

ĉirkaŭe: CHRISTIANO I PRINCE REGENT

meze: parto de horizonto kun aŭroro

meze-sube: 1933

Rimarko:



valorindiko: “skalo” > provizore ni konas nur du “pagilojn” de Atlantis, unu je 5 skaloj, alia je 20 skaloj, kun la sama reversa aspekto, sed en “blanka” metalo aŭ alojo. Probable ekzistas ceteraj tipoj kun variaj valorindikoj. Koncerne la poŝtmarkojn de Atlantis ni trovis la jenajn valorindikojn: 5, 10, 25, 50 kaj 75 skaloj. Ekzistas ankaŭ “dalo” = 100 skaloj = ½ usona dolaro.



Ni kore dankas nian membron Walter Klag el Vieno pro la bildoj kaj la informoj!

MEDALISTOJ

25 Dana Puchnarová(°1938)



La artistino naskiĝis en Prago, kie ŝi studis de 1953 ĝis 1957 en la Mezlernejo de Belaj Artoj kaj ŝi daŭrigis de 1958 ĝis 1964 la studadon en la praga Akademio de Belaj Artoj. De 1991 ĝis 2003 ŝi estis aktiva en la arta fakultato de la Palacký Universitato de Olomouc.

Dana partoprenis en multaj unuopaj kaj grupaj ekspozicioj en Ĉeĥio kaj eksterlande. Famega estis la ekspozicio okaze de ŝia 80a naskiĝtagreveno en GASK (impona arta kulturpalaco oriente de Prago). Ĝi prezentis koncizan kalejdoskopon de ŝia verkaro inter la jaroj 1961 kaj 2017. La graveco de ŝia profesia kariero kiel pentristino, ilustristino kaj grafikistino estas ĉefe ilustrata kaj honorigata per la 1948a kvinparta, kompona pentraĵo “Parto de Tuto”, litografio presita sur nerompebla vitro, admirebla en la famega “Nacia Galerio de Arto”.

Puchnarová estas konsiderata anino de la arta generacio kiu, komence de la kvindeka kaj sesdeka jardekoj, kondutis decideme per tute nova arta lingvo koncerne la problemojn de la tiama socio. Ekde de la komenco ŝi elmontris tutecan starpunkton rilate al la kreado de artaĵoj kiel rezultoj de interkovriĝado de diversaj artaj disciplinoj. Ŝi dialogadas kun literaturo, muziko, arĥitekturo, filozofio kaj psikologio.

Ŝia verkado de post 1965 estas krome senĉesa kritiko de la morala kaj ekologia fiaskoj de la politika kaj socia normigo en la tiama Ĉeĥoslovakio.



La medalo estas priskribata en ĉi numero.

G^{no} SEBERT leviĝis, dankis al D^{no} ZAMENHOF pro la invento de la lingvo kaj la faritaj servoj. Kiel dankesprimon, oni stampis specialan oran kvindekspesmilan medalon, okaze de la 25-jara jubileo. La medalon li transdonas al S^o SCHMID, kiu mem transdonas ĝin al gracia Svisino en naciaj vestoj; fine ŝi oferas la medalon al nia Majstro. Sur unu flanko, ĝi prezentas nian Majstron; sur la aliflanko estas gravurita simbola ŝildo surportanta stelon. Samtempe, alia Svisino malsupreniras la podion kun bela nacikolora kaj naciflora bukedo en la mano, kaj prezentas ĝin al la edzino de nia Majstro. Ambaŭ belajn noblajn gestojn salutas longa ovacio: ĉiu kongresano kore kuniĝis je ambaŭ fraŭlinoj por honori kaj ame danki la Majstran Paron.

La Revuo Bern 1913 p. 67 (La Naŭa Kongreso)

1,100 ESPERANTISTS MEET.

Twenty-three Nations Represented at the Berns Congress.

BERNE, Aug. 24.—The Ninth International Esperanto Congress opened here to-day with 1,100 delegates present, representing twenty-three nations. Twelve American representatives of both sexes marched behind the American flag in the opening procession.

Dr. Ludwig L. Zamenhof, inventor of Esperanto, received a gold medal in commemoration of the twenty-fifth anniversary of the language.

Two Hurt In Central Park Runaway

H. Di Kellikien, a dealer in antiques at 700 Fifth Avenue, broke his right leg, and Theodore Raia, an instructor in the Central Park Driving Academy, sprained his ankle yesterday afternoon when the horse behind which they were riding up the West Drive of Central Park took fright at an automobile, bolted, and overturned their dog cart on the West Lawn.

The New York Times

Published: August 25, 1913
Copyright © The New York Times

50 spesmilo coin

The **50 spesmilo coin** is a former commemorative coin of the Esperanto movement. It, along with 1 and 2 spesmilo pieces of similar design, was issued in **1912** in commemoration of the 25th anniversary of *Unua Libro*, the first publication describing Esperanto. The piece was authorized by the **Ĉekbanko Esperantista** or **Swiss Esperantists** and struck by the Swiss watch case and medal-making firm **Holy Frères**.

The piece was presented to L. L. Zamenhof (1859–1917), the creator of Esperanto, at the 9th World Esperanto Congress in Bern on **August 24, 1913**. It was mentioned in an article by *The New York Times* the next day, and briefly described by *La Revuo* in late 1913.

The coin is composed of **gold**. An illustration of L. L. Zamenhof appears on the **obverse**, and a depiction of a **shield** featuring the **green star** is illustrated on the **reverse**.

Only one example of the piece was manufactured. Its status and whereabouts are currently unknown.

References Edit

- Esperanta Numismatika Asocio – "Esperanta Numismatiko" (2015) (Esperanto)
- Klag, Walter (April 2017). "Esperanto-Mono". *Esperanto*. (Esperanto)
- Esperantismo kaj mono on the Esperanto Wikipedia

50 spesmiloj	
General information	
Movement	 Esperanto movement
Value	₮50.00
Years	1912
Measurements and composition	
Composition	gold
Appearance	
Obverse	L. L. Zamenhof
Reverse	Coat of arms
	v · d · e

SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ

La “malapero” de unika kaj ikona zamenhofa medalo



Super la ora 50-spesmila “monero” de 1912 ŝvebas mistera vualo. Krome, ŝajnas, ke la tiamaj ĵurnalistoj ne estis fotografistoj, ĉar ĝis nun nek skizo, nek fotografaĵo estis retrovitaj.

Ĉu ENA nun finfine povas fieri pro malkovro de la unua (kolora!) foto de tiu mistera memoraĵo, donacita al L.L. Zamenhof dum la naŭa UK en Berno? Bedaŭrinde ne! Sed, ĉar ni scias kiel ĝi aspektis- escepte la precizan aspekton de la valorindiko “50” Sm, la ekzaktan koloron de la oro kaj la mezurojn - ni petis sinjorinon J.H., neesperantistan komputilan fakulinon, provi rekonstrui la aspekton de tiu unika kaj nura ekzemplero. Laŭ ni la kreaĵo aspektas pli ol konvinke aŭtentika, ĉar kiel modelon ŝi uzis la tre ikonajn kaj samaspektajn, arĝentajn monerojn. *Ni kore dankas ŝin!*

Nu, ĉu tiu unika, nobla 50-spesmila monero (aŭ “pagmedalo”) **vere ekzistis aŭ ne?**

Sendube jes, ĉar estas sufiĉe da artikoloj, kiuj mencias ne nur la tiaman ekziston kaj aspekton, sed eĉ la eventon de la enmanigo al Zamenhof en 1913. Dank'al la riĉa biblioteko de nia membro Marc Vanden Bempt el Loveno (Belgio), ni povas eĉ prilumi kontribuadojn en diversaj eldonaĵoj:

- “*La Revuo*”: - sepa jk. n-ro 12 (84) de aŭgusto 1912, *en kiu la evento estas anoncita*.
- oka jk. n-ro 2 (86) de oktobro 1913, p.67, *kun raporto pri la enmanigo al Zamenhof.*(*vidu sur la antaŭa paĝo!*)
- “*Raporto de la Naŭa Kongreso de Esperantistoj / Berno 1913*”, Paris, Presa Esperantista Societo, 1913. *Sur paĝo ses troviĝas raporto pri la solena evento.*
- “*Naŭa Universala Kongreso de Esperanto / Oficialaj raportoĵ*”.
- “*The New York Times*”, *august 25, 1913*: “1.100 ESPERANTISTS MEET / Twenty-three Nations Represented at the Berne Congress”.(*vidu ankaŭ sur la antaŭa paĝo!*)

Ni nun finas per *provizore* neresponebla demando. **Kie nun estas tiu ora medalo?**

Dum konversacio okaze de la jubilea UK en Lille kun karmemora Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof, la nepo respondis al Bert, ke li memoras vitroŝrankon (*vidu jk.6 n-ro 4, p.11!*) en la domo de sia avo, Dzika 9 en Varsovio, en kiu la geavoj konservis kaj ekspoziciis valoradojn, kiujn Zamenhof iam aŭ ie ricevis. Laŭ la nepo, ankaŭ la ora medalo tre probable tie kuŝis...

En 1939 ankaŭ la Zamenhofa domo, Dzika 9 en Varsovio, estis tute detruita (*vidu jk.6 n-ro 4, p.12!*) de la hitleranoj. La meblaro malaperis (ĉu sub la ruinoj?) kaj la nemalhaveblaj arkivoj de Ludoviko pereis! Post la milito la ruinaĵo estis forigita kaj nova domo konstruita. Ĉu iu ulo trovis (i.a.) la oran medalon, kaŝis kaj forgesis ĝin? Ĉu li fandigis kaj “konsumis” la trovaĵon? Ĉu ĝi ankoraŭ kuŝas sub la “novaj” fundamentoj? Tre probable tiuj demandoj neniam ricevos respondojn; tamen ... tiu ora medalo certe **ne estis fantoma trezoro!**

ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

“Mirakla talismano” el Francio (1830)

1. Enkonduko

En la nokto de la 18-a de julio 1830, laŭ raporto de juna noviceino, Katarina Labouré, en la kapelo de la “Filinoj de la Karitato” en Parizo aperis la “Sankta Virgulino”.

Frato Arni (Prosper Decorte/ 1914-1987), katolika monaĥo kaj esperantisto, eldonis esperantlingvan, luksan faldbroŝureton titolitan “Senpaga por vi ... la MIRAKLA MEDALO”. La broŝuro informas pri la raporto de Katarina kaj ilustras ĝin per kvar belegaj, religiaj ilustraĵoj kaj skizo aŭ reproduktaĵo de la medalo kun esperantaj surskriboj. Ĝi originale havis francan tekston kaj poste amase aperis en diversaj lingvoj. La esperantlingva broŝureto aperis en la belga urbo Gento, la 31an de julio 1956.



2. La talismano medaletto



Franclingva specimeno el 1932



Skizo de la esperanta variaĵo el 1956

La teksto reproduktas la “vortojn de la Virgulino” en la franca: “O MARIE CONCUE SANS PECHÉ PRIEZ POUR NOUS QUI AVONS RECOURS À VOUS”. Fratulo Arni esperantigis tiel: “O MARIA SEN PEKO KONCIPITA PREĜU POR NI KIUJ RIFUGĜAS AL VI”.

Laŭ Maria la reverso ne bezonas tekston, ĉar la bildoj estas sufiĉe klaraj: la du koroj kaj la kruco signifas “proksimulamon, pentofaron kaj abnegacion”. La dekdu steletoj estas la simboloj de fervoro kaj apostolado. La litero M, kun traversa trabo kaj kruco, kompreneble estas la inicialo de la nomo MARIA.

Same interese estas la averso de la ovala medaleto kun pendigileto. Ĝi montras la Virgulinon, kiu per larĝa gesto levas la lumradiantajn manojn, kiuj simbolas la gracojn. Laŭ la novicino la Virgulino estis ordonanta: “Farigu medalon laŭ tiu ĉi modelo (...) kun la promeso alporti abundajn gracojn (...) por tiuj, kiuj havas konfidon”.



Grupo de flandraj esperantistoj antaŭ la fasado de la kliniko por mensmalsanuloj de Bierbeek (Belgio), kie Frato Arni laboris de 1957 ĝis 1987. La monaĥo staras antaŭe, inter la du viroj kun ĉapeloj.



Averso de iu poŝtkarto kun litografio kaj esperanta surskribo, probable influita de la mirakla medalo aŭ inverse...

Ni kore dankas nian membron Marc Vanden Bempt, kiu havigis al ni la broŝureton kaj ceterajn informojn.

POR SPUREMULOJ!

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ (preskaŭ) nenion.

21a enigmo



Lando: Ĉeĥoslovakio

Kvanto: ?

Metalo: ?

Pezo: ?

Diametro: 50 mm

Medalisto: ?

Jaro: 1987

Diko: ?

Ĉu farita laŭ iniciativo de Prof. Hradecky?

PORPACA MARŜO

JABLONEC N.N.

1987

Ĉu vi eble kunmarŝis en 1987?

HISTORIAJ ASPEKTOJ

Kluba medaleto de “La Verda Stelo” (1907)



Lando: Belgio (Antverpeno)

Metaloj: bronza aŭ

bronzo arĝentita

Mezuroj: 25 x 26 mm

Jaro: 1907



Eldonkvanto(j): *serĉata(j)*

Pezo: bronza: 8,16 g

arĝentita: 9,70 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: 1,5 mm

Averso:

Supre: surskribo: “LA VERDA STELO”

Ambaŭflanke: apartigita per arketo, laŭra branĉeto

Meze en cirklo: ĉirkaŭskribo slogana: “KLOPODU PERSISTU KAJ VI VENKOS”. Fiksita sur ankro (Antverpeno estas havenurbo) blazoneto kun kvinpinta steleto, la jaro 1907 (fondoĵaro de LVS) kaj surskribo “ESPERANTO”. La tuto “staranta” sur la norda parto de mondglobo.

Sube: “ANTVERPENO”

Reverso:

Uzita por gravuri la nomon de la honorigito (pro fidela membreco) kaj la jaro de enmanigo. Foje ankaŭ kun la kroma surskribo: “PRO MERITO”, sed en tiu kazo sen jarindiko.

Rimarko 1:

La plimulto de la rubandetoj estas malhelverda, sed kelkaj medaloj havas rubandeton kun du koloroj, blanka kaj verda.

**Rimarko 2:**

Laŭ klarigo de Ivo Durwael, iama prezidanto de LVS (1979-1985), okaze de dekjara jubilea membreco aŭ pro merito, membroj ricevis la “ordenon”. Okaze de nova jubileo, oni ne ricevis duan medalon, sed devis redoni la unuan por surmeti plian bronzan aŭ arĝentan steleton. Sur foto en la memorlibro de “La Verda Stelo” Ivo konstatis, ke antaŭaj prezidantoj, Jo Haazen (1970-1975), kaj Paul Peeraerts

(1975-1979) ankoraŭ transdonis medalojn. Ivo prezidantiĝis en 1979, sed ne memoras, ke li mem iam honorigis membron per medaleto.

Laŭmemore, Paul Peeraerts supozas, ke Jo Haazen nuligis la tradicion, ĉar la estraro decidis, ke tia medalo ne plu kongruas kun la tiama tempospirito. La novaj honorigitoj ricevis paperaĵon, kun “donaca karto” presita en metalece verda inko. Per la karto la tiama estraro ankaŭ celis plivigligi la kluban libroservon, ĉar la karto estis nur tie monigebla.



Rimarko 3:

Ekzistas dua tipo, ankaŭ bronza aŭ arĝentita, malpli dika specimeno (pezo: 1,41 g), farita laŭ la tekniko de inkuso, t.e. pregita dorsen per “spegula” stampo, tamen ne taŭga por gravuri surskribojn dorsflanke. Probable pli ĉipa ol la kutima medalo, do eble pro (necesa) kluba ŝparemo. Anstataŭ rubandeto tiu tipo havas simplan banteton.



Rimarko 4:

La origina medalo eĉ havas variaĵon, t.e. kun aŭ sen perletoj (ĉu laŭraj beroj?) tute sube.



Rimarko 5:

Probable pro funkcia diferenco ekzistis kaj bronzaĵ kaj arĝentitaj ekzempleroj; ni provizore ne havas klarigon pri la diferenco, ankaŭ ne pri la funkcio de kroneto sur certaj rubandetoj.

Bibliografio:

- André Staes: “ESPERANTO en ANTVERPENO 1907-2007/ Plena historio de la klubo La Verda Stelo”
- “Felix Archief (Antverpeno)-arĥivaĵo 2233#450

La redakcio kore dankas s-rojn Cyreen Knockaert kaj Roland Rotsaert pro la helpo kaj pro la permeso foti la muzeajn ekzemplerojn, respektive en la Biblioteko Van Biervliet en Kortrejko kaj en la Heredaĵa Biblioteko Hendrik Conscience en Antverpeno. Dankon ankaŭ al s-roj Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts pro la informoj, ĉefe en Rimarko 2.

TERMINARO

Alfabeto Listo (25)

apunto: *ŝanĝomono.*

asignato: *papermono eldonita de la franca registaro de 1792 ĝis 1797. Ekspropriigitaj ekleziaj posedaĵoj servis kiel garantiaĵoj.*

bankuo: *ĵargono (ĉe gejunuloj) por bileto aŭ valoro je 50 eŭroj aŭ je 50.000 eŭroj (ĉe krimuloj).*

bizanto: *iama ora monero en Bizanco. Unue menciita en la jaro 1291.*

investmedalo: *speciala medalo stampita okaze de solena enoficigo.*

kapverso: *flanko de monero kiu montras figuron de homa kapo.*

kontraŭstampo: *vidu: kromstampo.*

kromstampo: *posta stampado per kroma (man)stampileto sur jam stampita surfaco.*

laŭrita: *monero aŭ medalo montranta laŭrokronon aŭ laŭrokronitan personon.*

ĉirkaŭskribo: *surskribo ĉirkaŭa ĉe la rando de averso aŭ reverso de monero aŭ medalo.*

metalmono: *mono en monera formo.*

monersenalorigo: *malplialtigo de la interna valoro de moneroj, uzante pli da malnobla metalo en la alojo.*

monsenalorigo: *vidu: inflacio.*

nestampita monero: *monero sen stampita marko.*

novstampo: *monero farita per la originalaj stampoj, sed per uzo de alia metalo aŭ alojo.*

numismato: *fakulo, kolektanto aŭ komercisto, rilate al moneroj kaj / aŭ medaloj.*

oraĵisto: *metalprilaboristo, fakulo pri skizado kaj farado de juveloj artaj kaj uzobjektoj en noblaj metaloj, kiel plateno, oro, arĝento kaj aktuale ankaŭ paladio, titanitro, kaŭĉuko, plasto aŭ teksaĵo.*

randotranĉi: *fortranĉi parton aŭ la tutan konturon de monero por rekuperi noblan metalon.*

randskribo: *surskribo SUR la rando de monero aŭ medalo.*

stilo: *farmaniero de ĉiu figuro sur ambaŭ flankoj de monero aŭ medalo.*

trastrekita ĉeko: *ĉeko kiu, surhavanta du oblikvajn strekojn, estas pagebla ne per mono, sed nur en la konton de la profitanto, ĉe ties propra banko.*



VALORMARKOJ & VALORBILETOJ

Atesto “ESPERANTO-HOTELO” Herzberg 1989 (1)



Lando: Germanio

Kvanto: *serĉata*

Substanco: papero

Jaro: 1989

Mezuroj: 210 mm x 147 mm

Desegnisto: *serĉata*

Priskribo:

Kutime, tiel nomataj “**brik(et)oj**” estas fincsubtenaj virtualaj eroj aŭ konstruelementoj por (re)konstrui domon aŭ monumenton. En ĉi tiu kazo Esperanto-Societo-Südharz al volontuloj petis financan subtenon por konstruaĵo en Herbergo ĉe Harco, nomate vilao “Jues-Erikeo” aŭ Esperanto-Hotelo, pli precize por subteni la tiean bibliotekon, videtekon kaj aliajn aspektojn de la kultura agado en la “Esperanto-Urbo”.

Rimarko 1:

Ĉiu briketo havas propran laŭordan numeron.

Rimarko 2:

sur la bileto troviĝas du verdaj stampoj; unu kun esperanto-steleto kun majusklo E, alia kun la ĉirkaŭa teksto: *Esperanto Landesverband Niedersachsen im deutschen Esperanto-Bund Esperanto-Ligo Malsupra Saksio en Germana Esperanto-Asocio*

Rimarko 3:

sube troviĝas la nomoj de la prezidanto Petro Zilvar kaj de sinjoroj Otto Kern kaj Karsten Brille kaj ties subskriboj.

Rimarko 4:

la polaj poŝtmarkoj sur la specimenoj de la antaŭa paĝo kun stampoj de Bydgoszcz malkovras kvaran portreton en ronda “kartuŝo”.

Rimarko 5:

jen la kvar personoj en la rondaj kartuŝoj:



Joachim Giessner

Otto Kern

Walter Bormann

L.L. Zamenhof

Rimarko 6:

la “Hotelo” estu kunvenejo por esperantistoj. Tamen tiu projekto neniam estis realigita. La urba estraro tamen decidis doni al la komunumo la honoran nomon “Herzberg am Harz, die Esperanto-Stadt”.



Vilao “Jues Erikejo”

Daŭrigota

Ĉu ankaŭ arĝento?

Tiel anoncis Terry Watts, fidela kunlaboranto de ENA, sian aktualan kontribuadon: “Mi vere volas, ke la esperantistoj serioze traktu, kion mi proponas por solvi la problemon de praktika internacia mono uzebla dum niaj kongresoj. Tiu mia solvo (je mia opinio) kongruas kun la reteno de la ideo de Spesmilo kiel fundamenta (do difina) monunuo, evitas la klasikajn problemojn de bimetalismo, estas preskaŭ senkosta kaj eĉ ŝparos monon por la kongresanoj, kiuj venas el landoj, kiuj ne uzas la saman valuton kiel la kongrua lando.”

Miloj da jaroj antaŭ ol aperis moneroj (kiel oni nun komprenas tiun terminon) oni uzis oron kaj arĝenton (foje kupron) kiel monon. Necesis do en transakcioj pesi la kvanton de la uzata mona metalo, krom se oni uzis normigitajn kvantojn (ingotojn, ringojn ktp).

Tiu ligo inter pezo kaj mono postrestas ankoraŭ en diversaj lingvoj. En la angla, ekzemple, oni uzas la saman vorton por *pundo* kaj *funto*; la *ŝekelo* (moderna mono de Israelo; en la Biblio *siklo*) estis pratempe unuo de pezo; la *peso* (mono de Meksiko kaj landoj en Sud-Ameriko) estas pezo en la hispana.

Tamen la monero (kiu laŭ historiistoj ekaperis ĉ. 700 jaroj a.K.) signife diferencas de unuformigita pezo de mona metalo. La nominala valoro povas esti tute alia ol la valoro de la entenata kvanto da metalo. Povas okazi, ke la valoro de la metala enhavo superas la nominalan valoron, sed tio nur escepte. Pli kutime estas la nominala valoro, kiu superas la valoron de la konsistiga metalo.

[Notu tamen ke, en historiaj monistemoj, en kiuj la monunuo estis difinata kiel certa pezo de la mona metalo; ekz. dum la ornormigita periodo antaŭ la 1a mondmilito, estis karakterize, ke la moneroj, entenantaj tiun difinan monan metalon, havis la valoron de la entenata metalo.]

Efektive, la publiko estas tiel persvadata, ke la nominala valoro estas la vera valoro de la monero, ke oni traktas ĉiujn ekzemplerojn egale aĉetpovaj. Neniu hodiaŭ pesas siajn monerojn antaŭ ol butikumi en la supervendejo; oni ne konsideras siajn monerojn malpli valoraj, se trivitaj, kaj cetere tute ignoras ŝanĝojn en la konsisto. Kiam cirkulas samtempe moneroj kun la sama nominala valoro kun tute malsamaj intrinsekaj valoroj, tio estas apenaŭ rimarkata.



1971

La fandvaloro de la malnovaj bronzaĵaj 2-pencaĵaj pecoj en mia lando (tiuj fabrikitaj antaŭ 1992) havas hodiaŭ duoble la nominalan valoron, pro altiĝo en la prezo de kupro. Dume, la novaj, kiuj cirkulas samtempe kun la malnovaj, estas nur pecoj de ŝtalo, maldike tegitaj de kupro.

Sed, mi notis, observante la publikon, kiam oni pagas ĉe la vendeja kaso, ke oni neniam esploras la redonitajn monerojn, por apartigi la pli konservindajn.

Tamen, kreu min, la valoro de kupro pli kaj pli altiĝos.

Ĝis la decimaligo de la mono en Britujo(en la jaro, kiam komencis aperi la poŝkalkulilo, kiu permesintus al eĉ la plej malsaĝa ferianta eksterlanda vizitanto senĝene kalkuli kun pundo egala al 8 duonkronoj aŭ ŝilingo egala al 12 pencoj), ofte okazis, ke oni trovis en sia ŝanĝmono monerojn de tute diversaj intrinsekaj valoroj.

[La britaj arĝentaj moneroj stampitaj antaŭ 1920 konsistis el 92,5 % da arĝento, dum de 1920 ĝis 1946 (inkluzive) tiaj moneroj nur enhavis 50% da arĝento kaj ekde 1947 enhavis precize neniam da tiu nobla metalo kaj estis fabrikitaj el kupro-nikelo.]

Kompreneble, la pinto de reprezenta trompo estas la ne konvertebla papermono!

Ĉu en mondo, kiu ne konas monon alian ol la tiel nomatan fidatan monon, kiun oni pli kaj pli konsideras ne fidinda, estus surprizo, ke en ĉiuj landoj la aĉetpovo de la koncerna valuto estas plorinde malgranda frakcio de kio ĝi antaŭe estis?

Tamen ni,esperantistoj, meritas havi monerojn de vera valoro!

Oro estas jam delonge internacia mono kaj jam en 1907 estis proponita difino de internacia monunuoj por Esperantujo surbaze de oro, nome la Spesmilo, kies difino estis: 10 Spesmiloj kongruas al 8 gramoj da 22-karata oro.

Sed laŭ mia scio, oni neniam lanĉis oran Spesmilan moneron, kiun oni povintus praktike uzi por ĉiutagaj aferoj. Sen konsideri la koston de dezajno kaj stampado, monero konsistanta el 0,8 gramoj da 22-karata oro, estintus minuskle eta kaj facile perdebla. Pro ampleksaj konsideroj la plej malgranda praktika ora monero eble pezus minimume 4 gramojn kaj tiel jam havus valoron de 5 Spesmiloj, sumo certe tro valora por multaj ĉiutagaj aĉetoj.

Tamen, tiu problemoj ne estas unika por Esperantujo. Historie, en ĉiuj landoj, kiuj uzis orajn monerojn, tiu metalo estis rezervata por pli altvaloraj transakcioj, samkiel ĝi estis uzata en la pratempo, antaŭ la invento de la monero, do tiam kiam oni devis ĉiam pesi pecon post peco la koncernan uzitan monan metalon, por determini la valoron .

En oruzantaj landoj, por havi monerojn de taŭga valoro por malgrandaj aĉetoj, oni fabrikis monerojn ankaŭ el arĝento aŭ el bronzo (97% da kupro) aŭ eĉ el malpli valoraj metaloj.

En kelkaj landoj dum certaj epokoj, por ke la arĝentaj moneroj havu intrinsekan valoron respondan al la nominala valoro, oni adoptis oficialan kurzon inter arĝento kaj oro (bimetalismo). Sed tio enhavis propran problemon, nome ke la libermerkata kurzo povus tro varii de la oficiala.

Ankaŭ en Esperantujo indus havi monerojn arĝentajn, kies aĉetpova valoro estu la intrinseka valoro. Sed por konservi la Spesmilon kiel monunuon, necesus pensi kiel rilatigi ilin al la Spesmilo.

[Por transakcii je tre malgrandaj sumoj kredeble ne ĝenus utiligi paperbiletojn. Je tiu etvalora nivelo, apenaŭ estus profito en falsado, cetere oni povus perstampe limigi la validecon (loke aŭ tempodaŭre).]

Vi eble jam ekpensis, ke arĝentenhavaj moneroj por Esperantujo estas nura fantazio. Ni ne havas la resursojn por tion entrepreni,por ke la nominala valoro estu ankaŭ la metalenhava

valoro; cetere vi eble argumentus, ke tio neblas principe, ĉar la prezo de arĝento estas tro fluktuema rilate al oro, se ne paroli pri la valoro de arĝento en iu specifa fiatvaluto.

Sed pensi tiel preteratentas jenajn faktojn:

1. Abundas en la mondo moneroj, nun eksmonaj, kiuj entenas arĝenton kaj kies ekzakta fajneco estas publikigita en la reto, kaj kiuj ankoraŭ estas, se numismatike ne interesaj, akireblaj (per Ebay) je kosto proksima al la valoro de la arĝenta enhavo.
2. La elektronika poŝpesilo estas tre preciza kaj malmultkosta, kaj tio permesas tre rapide determini, kun kono de la fajneco, la valoron de iu ajn arĝentenhava monero de iu ajn pezo.
3. Esperantujo estas “sporada” lando. Niaj internaciaj kongresoj havas tre limigitan daŭron, malofte pli ol unu semajnon. Dum tiu mallonga periodo oni ne atendu signifajn ŝanĝojn en la kurzoj inter oro kaj arĝento. Tio permesus preskaŭ senriske fiksi (dum specifa esperantista evento) la valoron en Spesmiloj de certa pezo da arĝento.

Ilustra ekzemplo: la unufranka monero de la unua mondmilita periodo (tre facile havebla ĉar stampita en centoj da milionoj da ekzempleroj) pezis 5 gramojn kaj estas de fajneco .835. Do uzita ekzemplero entenas rondcifere 4 gramojn da arĝento (kalkulante iom da perdo de metalo pro uziteco).



franca

Ni supozu ke la aktuala rilatumo inter oro kaj arĝento estus 60:1. Tiam unu franko egalus $4/60 = 0,0666\text{g}$ da oro. Se la koncerna prezo de oro estus €45 por gramo, tiam (rondcifere) unu franko valorus €3. Sed ni volas scii la rezulton en Spesoj. Por tio ni devas kalkuli $(1000 \times 0,0666) / (0,8 \times 22/24)$, kio (rondcifere) estas 90 Spesoj.



belga

Por eviti en la praktiko troan kalkuladon, oni uzu simplan tabelon, montrantan la konverton al Spesoj de certa pezo da purarĝenta enhavo por iu multobla rilatumo inter oro kaj arĝento. La pezo de la purarĝenta enhavo de iu ajn monero estas simple la pesita pezo oble la fajneco.

La ordinara kongresano ne bezonus timi troan kalkuladon, por ke liaj alportitaj arĝentaj moneroj funkciu glate kiel mono dum la kongreso.

Mi imagas la jenan scenaron. Dum la kongreso funkcias borso. La deĵoranto pesas la donitajn monerojn kaj faras la necesajn kalkulojn por redoni Spesajn biletojn (kiuj kompreneble nur validos por tiu kongreso kaj estos klare markitaj tiel), aŭ se haveblas, taŭgajn ĵetonojn kiel la konataj Stelaj ĵetonoj el plasto.



Tiujn Spesajn biletojn (aŭ ĵetonojn) la kongresano povus elspezi, por aĉeti dum la kongreso kafon, librojn k.a. kaj se li ne volus alporti hejmen ne plu valorajn biletojn (aŭ ĵetonojn) kiel memoraĵojn, li povus reiri al la borso kaj rehavigi al si la ekvivalenton en moneroj aŭ, laŭplaĉe, la ekvivalenton en la loka valuto, samkiel povus fari fintage ĉiuj, kiuj vendis aferon dum la kongreso kaj akceptis paperajn aŭ ĵetonajn Spesojn en pago.

Kompreneble, ĉe la kongresaj budoj la vendistoj informu la klientojn pri la prezoj de siaj vendotaĵoj. Tamen ne necesus pene prezmarki en Spesoj ĉiujn vendotajn aferojn, kiuj povus esti jam prezmarkitaj en la valuto de la kongreslando aŭ en la valuto de la origina lando.

Ĉiu vendisto, kiu pretas akcepti pagon en Spesoj, afiŝus ĉe-bude konverto-tabelon, kiu permesus al klientoj kompreni la prezojn ankaŭ en Spesoj.

Rimarku, ke se la borso kalkulas ĉiun monŝanĝon, vende aŭ reaĉete per fiksita, kongresdaŭra kurzo, tiam la kongresanoj evitas la perdojn, kiujn oni kutime spertas je monŝanĝado ĉe bankoj.

Rimarku ankoraŭ, ke principe la monŝanĝado kontraŭ la proponitaj valorintrinsekaj moneroj, ne bezonus esti limigita al ŝanĝado nur al Spesoj sed ankaŭ povus esti al sumoj en la valuto de la kongresa lando. Tiel la borso estus tre avantaĝa por ĉiuj (ankaŭ por la spesodubantoj).

La borso apenaŭ povas perdi, almenaŭ en la nuna konjunkturo, en kiu la valoro de arĝento kaj oro nur povas kreski kompare al fiatmono, se ne aktuale, tamen tre baldaŭ.

Kontraŭ ĉiu Speso eldonita la borso tenos metalon de reala valoro, ĉu oron ĉu arĝenton. Sed tiu metalo akirita en monera formo estas akirita sen imposto kaj sen pluskostoj, kiuj povas alkroĉiĝi ĉe eksterkongresaj marĉandoj.

Kion devus fari la borso, se kongresano alportas moneron, kiu estas numismatike interesa, do estus tuj revendebla je prezo super la metalenhavo? Al tiu demando mi ne respondas. Ĉiu borso devas mem elpensi sian propran politikon.

Flanknoto 1. *Oni povas legi en la reto la aserton, ke estas 14 lingvoj, en kiuj la vorto por arĝento estas la sama kiel tiu, kiun oni ordinare uzas por mono!*

Flanknoto 2. *La konstitucio de Usono asertas (artikolo 10) 'No State shall make any Thing but gold and silver Coin a Tender in Payment of Debts'; (traduko) nur oraj kaj arĝentaj moneroj validas por la pago de ŝuldoj. Kio pensigus, ke eble la nuna papera dolaro, kiu hodiaŭ estas konvertebla ĉe banko nek al arĝento nek al oro, estus iom nekonstitucia!?*

Terry Watts

Rimarko de la redakcio: la aŭtoro preferas majuskulon por la monunuoj spesmilo kaj stelo.

La redakcio de ENA denove kore dankas sinjoron Terry Watts pro lia interesa teksto kaj invitas la legantojn reagi per retpoŝto pri la ideoj en la artikolo. Tiu temo estas tre interesa kaj grava por ĉiu nuntempa kaj venonta samidean(in)o!

EL LA GAZETARO

- 35 -

NUMISMATIKO

KIEL HAVIGI LA POLAN ARGĤNTAN MONERON KUN PORTRETO DE D-RO L.L.ZAMENHOF?

En ESPERANTO, oficiala organo de UEA, n-ro 7-8/1979 aperis informo, ke la Ŝtata monfarejo en Varsovio produktis en la serio de polaj moneroj sub la nomo „Grandaj poloj“ argĥntan 100-zlotan moneron kun portreto de d-ro L.L.Zamenhof, Unuflanke de la monero aperas la blazono de Pollando kaj aliaj kutimaj indikoj de la Pola Nacia Banko kaj aliflanke kun portreto de Zamenhof, rigardanta maldekstren, troviĝas ĉirkada surskribo Ludowik Zamenhof 1859-1917. La monero pezas 16,5 gramojn kaj havas diametron de 32 milimetroj. Ĝi estas emisita en malgranda eldonkvanto de 30 mil ekzempleroj. La moneron projektis Stanisława Watrobska. Jen ĉio kion ni eksciis ĝis nun.

La kolektantojn kaj numismatojn tamen pleje interesas kiel havigi la moneron, kiu fariĝos raraĵo? Pere de polaj amikoj ni eksciis pliajn informojn. La monero estas aĉetebla en Pollando nur kontraŭ dolaroj aŭ aliaj ŝanĝeblaj valutoj (markoj, frankoj, dinaroj ktp), kaj ĝi kostas 14 dolarojn. Krome estas aĉetebla proveldono, eldonita en malgranda kvanto, kiu kostas 22 dolarojn (kutime numismatoj ne kolektas provmonerojn). Sur la proveldono estas surskribo „Proba“. Oni vendas tiujn monerojn en PEWEX-vendejoj (en grandaj polaj urboj estas kelkaj, sed nur unu vendas monerojn), aŭ en bankoj PKO, kaj eksterlandano ricevas kvitancon, kiu rajtigas lin forporti translimen. Post ĉ. du jaroj ĝi estos aĉetebla ankaŭ kontraŭ zlotoj kaj koston probable 960 zl., tamen oni ne rajtos ĝin forporti eksterlanden, se oni pagis en zlotoj.

M. Ĝivoje, Zagreb

El: “KOLEKTANTO – HOBIA REVUO POR INSTRUO, ARTO KAJ AMUZO”. Bulteno de la Sekcio de la esperantistoj kolektantoj ĉe BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO.

JARO IX, 1979, N-RO 3-4, p. 33



RETPOŜTO

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

07.01.2021 17:50

Kara Jozefo!

Jen numero unu de 2021 por aŭdigi la startpafon de la oka jarkolekto!

Mi petas vin denove provlegi la artikolojn kaj instrui min pri eventualaj eraroj (mi esperas, pri neniuj aŭ nur pri novaj!). Mi evidente kore antaŭdankas vin!

Krome mi havas tre specialan, alispican peton, kiu tamen tuteNE urĝas.

Pro mia aĝo (mi naskiĝis en 1948) mi -pro singardo- intencas ĉi-jare ekkompili la priskribojn en “Moneroj & medaloj” por “konstrui” bazan version de la “Unua Katalogo de Esperanta Numismatiko”.(UKEN). Tial jen mia peto al vi, verki ENKONDUKON por prezenti tiun estontan konsultlibron.

Se vi akceptus, vi mem decidu tute libere pri enhavo kaj amplekso. Estus vere por mi grandaj honoro kaj kontenteco, se vi konsentus!

Amike kaj numismate,

Bert



18.12.2020 15:31

Kara samideano Tonii!

Mi ne scias, ĉu vi memoras, ke vi en 2019 sukcese helpis min priskribi la medalon unuan, maldekstre, el 2003.

Dume samideano el Ĉinio sendis al mi foton de medalo (dekstre) kiu estas en ĉina muzeo. Jes!

Por povi priskribi la duan medalon mi bezonas kelkajn informojn: la eldonjaron, la pezon, la metalon aŭ alojon, la diametron, la eldonkvanton, la dikon kaj, se eble, la nomon de la artisto-medalisto. La intenco estas publikigi ĝin en la revuo de ENA kaj poste enpresi ĝin en la “UNUA ESPERANTO-NUMISMATIKA KATALOGO”. Evidente mi sendos al vi la koncernan numeron de la revuo.

Mi esperas, ke vi denove povus helpi min kaj tiurilate antaŭdankas vin tutkore!



(medalo 1)



(medalo 2)

*Samideane kaj numismate,
Mag.Fil. Bert Boon
Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)
Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"
Fakdelegito pri numismatiko*

21.12.2020 7:28

Saluton,

Plej precizan informon pri la medaloj povas doni Madis Linnamägi, kiu estis organizanto de amatorartaj konkursoj „Kannel“. Mi sendas vian leteron al li.

Amike

Tõnu Hirsik



30.12.2020 12:14

Kara Ana!

Ĉi-sube vi vidas skanon de tre konata hispana plakedo (eble posedaĵo de via muzeo, mi esperas!), kiun mi intencas priskribi en la ENA-revuo. Tamen mankas al mi informoj kaj mi esperas, ke vi povus helpi trovi kelkajn mankantajn elementojn. Via respondo tute ne urĝas!

Elkore mi antaŭdankas vin!

Amike kaj numismate,

Bert



Placa Esperantista en honor a Mangada

07.01.2021 21:17

Kara Toño,

Mi ricevis suban peton en la biblioteka retroŝtujo. Eble vi povas doni la petitajn detalojn.

La informo aperos en la revuo Esperanta Numismatiko: <http://bitoteko.esperanto.es/xmlui/handle/11013/4387>

Amike,

Ana Manero

[Biblioteko Juan Régulo Pérez](mailto:biblioteko@esperanto.es)

biblioteko@esperanto.es

Kara Bert:

Jen Toño del Barrio, el Hispanio. Ana sendis al mi vian mesaĝon rilate al la ŝildo honore al Mangada.

Eble vi trovis ĝin en mia persona retejo, kie mi publikigis biografion de Mangada kaj aperas tiu bildo: <http://delbarrio.eu/mangadauni.htm>

Bedaŭrinde, mi ne scias multe pli pri la plato mem. Mi skanis ĝin el foto kiun sendis al mi antaŭ kelkaj jaroj kamarado el Katalunio, Santiago Torné. Se mi ne mismemoras, li ricevis ĝin de Raymond Boré, iama delegito de UEA pri ZEOj. Neniu el ili konis la detalojn de la plato nek de la cirkonstancoj kiujn ĝi travivis.

Ĝi estis komisiita en la komenco de la hispana milito (en oktobro 1936), ĉar tiam estis la momento en kiu la famo de Julio Mangada estis pli granda. Kiel vi povas legi en tiu retpaĝo, Mangada tre ĉefrolis en tiu periodo, en kiu li ricevis amason da agnoskoj pro sia agado kape de respublikista taĉmento. Ekzemple, li ricevis la "oran medalon" de la urbestro de Madrido kaj aliajn. Post oktobro lia rolo tre rapide malkreskis.

La teksto de la plato jenas:

"Al Prezidanto de Hispana Esperanto-Asocio generalo D. Julio Mangada Rosernörn. Tre kompetenta kaj nelacigebla batalanto de la Esperanto-movado en Hispanujo. Rekoninte liajn meritojn dediĉas tiun ĉi dankecan pruvon la madridaj samideanoj. Madrid. Oktobro de 1936"

(du notoj: li fakte ne estis oficiale Generalo; liaj trupoj nomumis lin tia, sed la registaro nur agnoskis la rangon de kolonelo. La mallongigo D. signifas Don, la kutiman respektoformon antaŭ personaj nomoj en la hispana lingvo)

Ni tamen ne scias al kio estis destinita la plato. Ĉu estis io ekspoziciita en iu loko de Madrido, kaj kie, ĉu temis pri donaco, ktp. Ni scias ankaŭ nenion pri ĝiaj fizikaj ecoj.

Ĝi ne konserviĝas nun. Se ĝi restis ie en Madrido, mi supozas ke la venkintoj de la milito detruis ĝin. Se ĝi troviĝis ĉe Mangada, li ne portis ĝin al la ekzilo; tion ni scias ĉar antaŭ kelkaj jaroj revenis liaj posedaĵoj, kiuj nun troviĝas en oficiala arkivo; mi havis la okazon ekzameni ilin, kaj tie ne troviĝas la plato.

Mi bedaŭras ke mi ne povas helpi vin pli. Se vi havas pliajn demandojn, ne hezitu demandi denove.

Kun koraj salutoj,

José Antonio del Barrio

09.01.2021 13:35

Kara samideano Toño:

Unuavice, multan kaj koran dankon pro via ampleksa kaj ege interesa respondo!

Fakte, la plaketon mi jam konis el via artikolo, kiun mi iam legis kun multe da intereso kaj relegos baldaŭ por kontroli kaj kompletigi la artikolo(j)n aperonta(j)n en la ENA-revuo, tre probable je la fino de septembro 2021 (pro manko de spaco en tiu rubriko en la antaŭaj venontaj numeroj!).

Ne gravas, ke vi aktuale ne havas informojn pri fizikaj ecoj de la objekto; numismatoj ja neniam rezignas spuri “trezorojn”! Mi estas ege kontenta, ke foto estis iam savita...

Ege interesaj kaj tre taŭgaj por mia laboro estas la aliaj historiaj faktoj, ankaŭ tiuj surbaze de via persona sperto kaj laste sed ne balaste la esperanta teksto sur la averso, kiu ebligas sufiĉe komplete priskribi la plaketon.

*Se “superakviĝus” novaj demandoj en mia kapo dum la laborado, mi certe denove kontaktus vin. Nu, kion mi jam povas promesi, estas, ke mi sendos al via retadreso la rezultojn en artikolo(j) kiu(j) aperos en “Esperanta Numismatiko”. **Krome mi daŭre estos reciproke je via servo, se aŭ kiam mi povus iel helpi aŭ subteni vin!***

Kun tutkoraj salutoj

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

29.01.2021 10:18

Kara Bert,

koran dankon pro tiom riĉa fonto de dokumentoj. Certe mi ĉerpos el ili ...

Josef Kříž, Ing.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

11.02.2021 11:03

Kara samideano Foppe-Klaas,

bonorde mi ricevis la numeron unuan de la 26a jarkolekto de “Fenikso”, enhavriĉa kaj belaspekta esperanta revuo.

Tutkore mi dankas vin pro la inform- kaj varbcela artikolo pri ENA, kiu espereble persuados nederlandajn samideanojn aliĝi aŭ almenaŭ peti provnumeron.

Danke kaj donace mi aldonas nian plej aktualan numeron de “Esperanta Numismatiko”. Vi rajtas uzi aŭ peti artikolojn el nia revuo, menciante la fonton.

Amike kaj numismate,

Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)(2013)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko

11.02.2021 22:37

Dankon pro la revuo. Ni legos ĝin.

Mi esperas, ke ENA prosperos.

Kun amika saluto,

Foppe-Klaas Hovinga

Redaktoro de la revuo Fenikso

tel. 0575-470455, tel. 06-12551449

Esperanto - internacia lingvo

www.esperanto-nederland.nl



19 12 2020 19:07

Kara amikino!

Antaŭ nelonge mi trovis bildon de bronza medalo ĉeĥoslovaka, kun la busto de Zamenhof kaj reverse la tekston: PORPACA MARSO JABLONEC N.N. CSSR 1987. Mi scias, ke tiu urbo situas nun en Ĉeĥio, sed eble vi konas personon aŭ asocion kiu povus helpi min sendonte informojn. Se ne eblus, mi petas vin pardonon pro la ĝeno!

Bert

02.03.2021 18:02

Kara Bert,

mi respondas nur nun, ĉar mi estas ekster la reto jam de duono de decembro :-(

Kiam mi skribis al google PORPACA MARSO JABLONEC N.N. CSSR 1987

venis la paĝo en la angla - vidu la alkroĉaĵon.

Samtempe mi sendas ĉi mian mesaĝon kun via peto al niaj du gesamideanoj, kiuj eble kapablas diri pli multe al la temo (antaudankon por via eventuala reago al Bert, karaj Pavla kaj Mirek!)

Haste sed amike (el reto de mia amikino), korsalutante vin ĉiujn kaj esperante, ke vi senvirusas

Fejfi

A N O N C O J

&

E V E N T O J

'Buntaj Vesperoj' en Herzberg - la Esperanto-urbo: Esperanto-moneroj kaj medaloj

2021

mardo**marto**02

Prelego de Ottmar Jareb pri vojaĝspertoj en Irano

Enkadre de la serio **'Buntaj Vesperoj' en Herzberg - la Esperanto-urbo:**

Prelego de Ottmar Jareb pri siaj travivaĵoj en Irano. Lernado pri lando, popolo kaj kulturo.

Diskutado pri vojaĝado per Esperanto, memoroj, spertintersanĝo.

Bonvenon al ĉiuj interesigantoj, kunagantoj, geamikoj, gastoj!

En ĉiu mardo inter 19:00-21:15 ni prezentas alian temon kaj diskutadas, intersangas spertojn, opiniojn kun la celo, ke ni akiru pli bonan lingvan kapablon kaj eklernu interesajojn el la mondo per la uzo de la internacia lingvo Esperanto.

Jen kelkaj sekvaj temoj, prezentadoj:

09.03. La kolektaĵo de Esperanto-moneroj kaj medaloj (Peter Zilvar)

16.03. Miaj travivaĵoj, aventuroj en Hindio (Ottmar Jareb)

23.03. Kia estas bona informado, efika varbado? Prezento de variaj, interesaj Esperanto-informiloj, varbiloj, varbmetodoj (Peter Zilvar)

Nomo: **Buntaj Vesperoj en Esperanto-urbo Herzberg**

Tempo: **16.02.2021 19:00-21:15** Amsterdam, Berlin, Rome, Stockholm, Vienna

<https://us02web.zoom.us/j/89917507096>

Enirkodo: 18872021

Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!

Bert

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol ses jaroj ĝis 148 individuaj membroj kaj 22 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŭti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

bert.boon@skyne.be